

ESPERANTO

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★



★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

La mondfama dana baletto de la Reĝa Teatro en Kopenhago

N-ro 606 (5)

Majo 1956



REVUO INTERNACIA

ESPERANTO

Revuo Internacia

N-ro 606 (5).

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Arangoj kun U.N.E.S.C.O)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Ĉion por la redakcio oni sendu al la
Redaktoro: W. AULD

Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrew-
shire, Skotlando.

* * *

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo
ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj)
sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASO-
CIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.
Telefona: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

* * *

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian
represajon al nia redakcio.

Jara abono (1956): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj
jarlibro 10 n.gld.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
	1/16 paĝo	8.— gld	

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkuponon por
ĉiu duon da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

E. Malmgren, prezidanto, Heleneborgsgatan 6,
Stockholm, Svedujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77
Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Bri-
tujo.

D. Kennedy, vic-prezidanto, 21 Westfield Road,
Bishop Auckland Co. Durham, Britujo.

P. M. Mabesoone, estrarano pri financoj, Pytha-
gorasstraat 122, Amsterdam-O, Nederlando.

R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai
Vauban, Perpignan (Pyrénées-Orientales),
Francujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,
Britujo. Telefona: ARNold 90-81.

ENHAVO

		Rubrikoj	
Impona transcendo, D. Dalmau	73	A.P.O.	74
Instruoj el eraro	73	C.E.D.	75
Postkongresa aranĝo	74	Internaciaj Konkursoj	77
La Ilustrita Vortaro	77	Festtaga Konkurso	77
Jugoslavio serĉas kulturajn rilatojn pere de Esperanto	78	Esperantista vivo kaj Nekrologo	78
Dudek-kvin jarcentoj de Budhismo	79	Novaj Libroj	83
Mise. Nils Ferlin (M. Carlsson)	84	Radio-Babiloj (6)	85
Antaŭkongresa aranĝo	85	Nia Forumo	86
		Oficiala Informilo	87
		Radio	88

IMPONA TRANSCENDO

Instruoj

el Eraro

Eĉ se temas pri realaĵoj „eksteraj”, „objektoj”, samaj objektoj estas tiel diferencaj al ĉiu homo kaj el ĉiu homo, ke ili estas prezentataj, pentrataj, ĉu laŭ Greko aŭ Van Gogh, laŭ Velázquez aŭ Picasso — senfine diferencaj. Ni devas akcepti kuraĝe, sentime, ke vivo aŭ mondo de homaro estas fluktua, evolua — diferenca laŭ epokoj, eĉ en sama epoko laŭ skoloj kaj aŭtoroj. Ellerninte lingvon, parolado-verkado fariĝas arto, kiel pentrado, muzikado, dancado. Samepokaj, samnaciaj, samartaj Téniers kaj Van Dyck — kiel diferencaj la respektivaj pentraj dialektoj kaj dialektikoj! Lope de Vega kaj Cervantes, samepokaj, samlingvaj, eĉ samprovincanoj — kiel diferencaj la respektivaj personaj dialektoj kaj dialektikoj! Tamen, tiuj kaj ĉiuj pentristoj kreis la *komunan* pentrokulturon, kaj tiuj grandaj verkistoj kaj ĉiuj aliaj kastillingvaj kreis la kulturan kastilan lingvon. Tute simile, idente, la grandaj esperantistaj verkistoj kaj oratoroj, ekde la Majstro, kreas la Esperantokulturon kaj novan civilizacion, profunde *komunan*, eĉ se niaj pioniroj aperas lingve tiel diferencaj kiel Privat kaj Kalocsay. Sub ĉiuj personaj pentraj dialektoj kaj dialektikoj, tiel diferencaj kiel tiuj de Caravage kaj de Greko, de Rubens kaj de Van Dyck, de Murillo kaj de Goya, estas la komuna sento: ke blua koloro, ĉiela koloro, simbolas purecon, kaj ruĝa: sangon kaj fajron. Tiel same sub ĉiuj personaj lingvaj dialektoj estas la komunaj zamenhofaj lingva fundamento kaj „nova sento” por interkompreno — animo de Esperantujo. Ni devas agnoski, kompreni, ke lingvo estas malpli objektiva ol materia, ekstera afero, kaj tial pli fluktua, kiel vivo, biologio, animo, psikologio. Sed tamen, per franca lingvo homaro kreis, interkomprene, eŭropan kulturon, kaj per angla, kaj per rusa — precipe naciaj lingvoj. Ĉu ne pli universale per Esperanto, precipe internacia? Do, ĉesu timoj, kaj antaŭen prudente, singardeme, saĝe!

Se per naciaj lingvoj estas kreitaj kulturoj, eĉ civilizacioj, per internacia lingvo kaj plenhomara spirito, la perspektivo ja estas universala. Eble ni mem, la esperantistoj, atenteme al cirkonstancaj problemoj de nia propaganda batalado, ne vidas la plenan transcendon de kulturo, de civilizacio per Esperanto. Eble nur per neŭtrala lingvo kaj plenhomara spirito povos estiĝi unuafoje en la mondo tuthomara kunfratiga civilizacio.

Esperantujo naskiĝis, kreskas, evoluas plej normale: unue estiĝis amo — de Zamenhof al homaro, kontraŭ ĉi-ties viktimizeco videble okazanta pro lingvaj baroj. Konsekvence li suferis, oferis klopodon por solvo, rimedo. Sekve naskiĝis Esperanto kun animo kontraŭ malamikeco inter popoloj. Privat rakontis pri *vivo* de Zamenhof kaj esprimo de *sentoj* en Esperanto. Poste venis plena gramatiko kaj plena vortaro. Post Zamenhof: Kalocsay, Waringhien. Post Privat: Lappenna.

Ni ankoraŭ ne venkis militeman, imperieman, homaron; sed ni venkis krizojn, malsanojn, parodiojn el nia movado aŭ kontraŭ ĝi.

Ni povas nun priparoli ĉiujn lingvajn problemojn. Esperanto ja estas sufiĉe provita. Ni devas esti saĝaj sed kuraĝaj, kuraĝe saĝaj kaj saĝe kuraĝaj.

Neniam ekzistis civilizacio sur natura neŭtrala lingva fundamento. Kiam nacia lingvo kreis civilizacion, en ĝi estis imperia spirito. En esperantista homaro regas rezigno pri internaciigo de privata, de nacia lingvo; kaj eĉ nacilingve ni verkas laŭ internacia spirito. Do unuafoje en Homarujo proviĝas spirite internacia civilizacio. Jen transcendo de nia movado, kiun ni devas elstarigi, kiu fine efektiviĝos la belan revon de Zamenhof pri homaranismo.

Tia transcendo ja devas imponi al ni.

Delfi Dalmou

„Esperanto”, „La Praktiko”, „Heroldo” kaj preskaŭ ĉiuj aliaj esperantaj gazetoj informis, ke Molotov sendis telegramon en la angla lingvo kaj en Esperanto al la Japana Popola Konsilantaro.

Nun montriĝis kun plena certeco, ke tiu informo baziĝas sur eraro. Molotov ja sendis telegramon, sed ĝi estis skribita en la rusa kaj angla lingvoj, ne en Esperanto.

Estas interese — kaj ankaŭ instrue el pluraj vidpunktoj — sekvi la formiĝon de tiu falsa informo, ĝian rapidegan disvastiĝon tra la mondo kaj la komentariojn, kiujn ĝi ricevis en diversaj medioj.

Antaŭ ĉio ni vidu kiel ekestis la eraro.

Sinjoro Mazima, oficisto de la Japana Konsilantaro, ricevinte la dulingvan telegramon, rekonis la anglan tekston, sed li opiniis ke la alia teksto, ankaŭ skribita per latinaj literoj, estas en Esperanto. Pri tio li informis la reprezentanton de la Japana radio, kiu tuj elsendis la novaĵon. Fulmorapide ĝi estis reproduktita de pluraj aliaj radio-stacioj, ekzemple de Wien kaj de Budapeŝt. Verŝajne surbaze de la elsendo el Budapeŝt, la novaĵon alportis unu el la plej seriozaj kaj plej gravaj britaj dimanĉaj gazetoj „Sunday Times”. De tie ĝin reprenis centoj da gazetoj en diversaj partoj de la mondo.

Intertempe la londona korespondanto de „American Broadcasting Company”, post kiam li ricevis el Tokio konfirmon pri la „vereco” de la telegramo „en Esperanto”, havis intervjuon pri la afero kun la Sekretario de Brita Esperantista Asocio. La intervjuo estis disaŭdigita la 25-an de januaro c.a. 7,35 laŭ la tempo de New York sur la tuta reto de ABC. Denove miloj da gazetoj tra la mondo skribis pri la afero. La Informa Fako de UEA ĉiutage ricevis multajn eltranĉaĵojn de la kunlaborantoj en diversaj landoj. Kiel oni povis atendi, la komentoj kaj precipe la titoloj, sub kiuj estis publikigita la sensacia novaĵo, ne malofte estis tre tendencaj, ekzemple „La komunistoj adoptas Esperanton”, „La ruĝuloj uzas Esperanton” ktp. Plue, ŝajnas ke okazis misprezentoj ankaŭ rilate la intervjuon de la sekretario de BEA. Laŭ British Esperantist li deklaris en la intervjuo: „Mia respondo al Molotov estus, ke la esperantistoj de la mondo bonvenigus la disrompon de la fera kurteno, tiel ke la popoloj estus liberaj interrilatiĝi”. Sed pluraj gazetoj, ekzemple „L'Alsace” de la 24-a de januaro 1956 raportis, ke la sekretario de BEA diris: „Mi ne imagis, ke s-ro Molotov estis adepto de Esperanto...” Diferenco sufiĉe granda!

La tri faktoj — nome, ke 1/ la informo pri la „Esperanta” telegramo aperis en tiel serioza gazeto kiel „Sunday Times”,

2/ ĝi estis disaŭdigita de ŝtate kontrolita radio-stacio en Orienta Eŭropo, 3/ ĝi estis konfirmita el Tokio al granda agentejo kiel ABC, ĉio ĉi en ligo kun vere sensaciaj novaĵoj el Sovet-Unio sur tute aliaj kampoj — igis la sciigon se ne kredenda, do almenaŭ kredebla. Sed la fakto, ke oni komencis interpreti ĝin en diversaj medioj laŭ sia propra gusto kaj politikaj celoj, nepriĝis en ĉiu okazo, senkonsidere al pliaj pruvoj pri la verco, rapidan reagon fare de la Esperanto-Movado. Montriĝis necese urĝe korekti ĉiujn misprezentojn kaj miskomentariojn, kiuj povus kompromiti la neŭtralecon de la Esperanto-Movado kaj sekve malutili al la pozicio de Esperanto. Tial la Informa Fako de UEA prizorgis specialan artikolon, en kiu estis mallonge prezentita la negativa starpunkto de la sovetaj aŭtoritatoj rilate Esperanton en la lastaj 20 jaroj kaj la nuna fakta situacio kun rimarkeblaj signoj de reviviĝo de la Esperanto-Movado. Tiu artikolo, siavice, aperis en multaj gazetoj en pluraj lingvoj (Esperanto, angla, franca, hispana, germana, portugala, itala, sveda, finna ktp.) Tiamaniere la tuta afero, eĉ se oni akceptis la supozon pri la Esperanta telegramo kiel veran, ricevis objektivan prilumon.

Intertempe la „novaĵo“ atingis el Eŭropo niajn japanajn ĝeamikojn. S-ro Sihej Mijake persone vizitis la oficejon de la Japana Konsilantaro kaj petis, ke oni montru al li la telegramon. Li tuj konstatis, ke ĝi estis skribita ne en Esperanto, sed en la angla kaj rusa lingvoj. Tiamaniere malkovriĝis la eraro, kiu kaŭzis tiom da bruo.

Kaj la instruo?

Unue la fama „Esperanto-telegramo“ montras ankoraŭfoje la tutan mizeron de la fakta stato koncerne la scion de fremdaj lingvoj. Eĉ tiel grava lingvo kiel la rusa ne povis esti eĉ rekonita kiel tia, eĉ ne en organizajo nepre simpatia al nuna Ruslando. Tri „eĉ-oj“ pli ol karakterizaj! Devis veni esperantisto por „malkovri“ la grandan „sekreton“ kaj „deĉifri“ la „mistikan“ tekston. Ankoraŭfoje montriĝas la praveco de nia aserto, ke la fremdaj naciaj lingvoj estas ĝenerale tre malbone konataj en eksterlando, malgraŭ ĉiuj kontraŭaj fanfaronadoj.

La dua instruo estas, ke en la hodiaŭaj cirkonstancoj, tia novaĵo, per si mem sensacia, neniel montriĝas tiel nebla. Ne estis iaj triarangaj gazetetoj kiuj alportis ĝin, sed amaso da gazetetoj, inter kiuj multaj kun senduba reputacio de altgrada seriozeco. Tio signifas, ke la eraro, kvankam ĝi objekte okazis, neniel estas „eraro“ el vidpunkto de la principaj eblecoj en la nuntempa mondo.

La tria instruo, tre grava el vidpunkto de la Esperanto-Movado, estas donita de la interpretado, kiun pluraj gazetetoj, esprimantaj la starpunkton de difinitaj medioj, donis al la afero. La falsa novaĵo povas esti konsiderata kiel perfekta eksperimento pri tio kio okazos, kiam fakte unu registaro, precipe se temos pri

granda potenco, ekuzos oficiale Esperanton. Depende de tio kiu registaro faros tiun paŝon, la Internacia Lingvo estos tuj proklamita de la alia flanko aŭ kiel „ruĝula“ rimedo de „subversiva propagando“, aŭ kiel „burĝa kosmopolita“ afero en la servo de la „monda imperialismo“. Estos necese bone atenti al tiu instruo kaj klopodi, se iel eble, ke Esperanto estu iom post iom oficialigita paralele en la tuta mondo por eligi el la manoj de la principaj kontraŭuloj tiajn senbazajn pseŭdoargumentojn.

I. L.

Postkongresa aranĝo en Norvegujo

La landaj asocioj de Danujo, Norvegujo kaj Svedujo interkonsentis ke ĉiujare unu el ili aranĝu sian jarkunvenon ne dum Pentekosto, por ebligi al la membroj viziti kelkfoje ankaŭ la jarkunvenon aŭ kongreson de la najbaraj landoj, en la espero tiel plifortigi la kunlaboron. Ĉi-jare la vico venis al Norvegujo, kaj Norvega Esperantista Ligo decidis okazigi sian jarkunvenon en Oslo dimanĉon la 12-an de Aŭgusto, do tuj post la kongreso en Kopenhago.

Estas la espero de la estraro de N.E.L. ke ankaŭ gesamideanoj ekster la skandinaviaj landoj volos viziti la jarkunvenon kaj interŝanĝi kun ni spertojn kaj ideojn. Sed supozeble oni ne volas iri al Norvegujo nur por unu tago. Ni tial, interkonsente kun la L.K.K. en Kopenhago, starigis planojn pri kelktagaj ekskursoj tra Norvegujo, kiuj ekiros el Oslo lundon matene la 13-an de Aŭgusto. (Pro bedaŭrinda okazaĵo tiuj planoj ne trovis lokon en la 2a Bulteno de la Kongreso). Tiuj ekskursoj trapasos plej pitoreskajn, parte altmontarajn regionojn de Suda Norvegujo.

Interesiĝantoj povas ricevi ĉiujn detalojn ĉe: Postkongresa Ekskurso, Box 942, Oslo, Norvegujo.

C. STOP-BOWITZ.

Japanujo

La eldonprojekto „Infanoj de la Mondo“, kiu aperigas en japana lingvo verkojn de diversnaciaj infanoj diversmaniere kolektitajn, sed ankaŭ ĉefe per Esperanto, ankoraŭ bezonas materialon por poste aperontaj volumoj. Oni deziras ricevi verkojn de infanoj 6 ĝis 15 jaraĵ. Se la kolektita materialo povas esti tra-

dukita en la anglan, francan aŭ en esperanton, tiom pli bone; sed ĉiokaze oni petas ke la materialo estu kolektita kaj sendita al: Infanoj de la Mondo, Heibonsya, Yonbantyo, Tiyodaku, Tokio. Limdatoj estas jenaj: Sudameriko: majo 1956; Italujo, Hispanujo, Portugalujo, Grekujo: julio 1956; centra kaj okcidenta Azio, Afriko: septembro 1956; Aŭstralio, Novzelando: novembro 1956.

La Eŭropa Konsilantaro prokrastis sian decidon

Pro la tro ŝarĝita tagordo la Eŭropa Konsulta Asembleo ne povis pritrakti dum la ĵus finita sesio la proponon de la 14 reprezentantoj pri eksperimenta enkonduko de Esperanto en kelkajn lernejojn de kvin landoj.

Tiu demando estis denove diskutata en la Kultur-komisiono la lastan tagon de la sesio, nome sabaton la 21-an de aprilo. La germana reprezentantino D-rino Reckling prezentis tre objektivan skriban raporton. La komisiono prokrastis la finan decidon ĝis la oktobra sesio, ĉar ĝi ne povis interkonsenti. Sep reprezentantoj apogis la proponon kaj sep estis kontraŭ.

EL HUNGARLANDO

La hungaraj esperantistoj aranĝos la 13an de majo en Kulturhejmo de la XXa distrikto de Budapeŝt tutagan regionan esperanto-renkontiĝon, kiel gastoj de la esperanto-fakrondo de la kulturhejmo. Oni petas salutskribojn el ĉiuj landoj kaj la alsendon de ekspozicia materialo diversa por nun pretigota konstanta migranta ekspozicio. Tio helpas la revigliĝantan movadon. Adreso: Esperanto fakrondo, Vasas Kulturothton, Budapeŝt XX, Pesterzsébet, Nagy György István- u.2., Hungarlando.

Korekto

En ESPERANTO, septembro 1955, p. 245, ni presigis la informon, ke reprezentanto de la novzelanda registaro salutis la Kongreson.

Fakte, la reprezentanto de Novzelanda Esperanto-Asocio, s-ro Thawley, ne salutis la Kongreson en la nomo de la registaro, sed nur en la nomo de la ĉefministro persone.

Ni sincere petas pardonon de la ĉefministro de Nov-Zelando, s-ro S. G. Holland, kaj de N.Z.E.A., pro tiu erara informo. — Redaktoro.

APO Agado en Proksima Oriento

Kun danko ni kvitancas la donacon de S-ro Ernesto Sonnenfeld el Buenos Aires, kiu sendis la sumon de 30.— n.g.l. Multaj personoj sendis uzitajn poŝtmarkojn al la Administra Oficejo. Nun ni bezonus filateliston, kiu bonvolus okupiĝi pri la klasigado de tiu stoko, kaj ĝia valorigo. Ĉu tia persono bonvolus sin anonci al la Adm. Oficejo?

T. SEKELJ.

ESPERANTO EN LA EDUKADO

Dum pluraj jaroj la internacia asocio de la instruistaro (I.L.E.I.) kun la helpo de multaj individuaj instruistoj kaj edukistoj laboris por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. La rezolucio de Unesko en Montevideo deklaras la daŭran interesiĝon de tiu alta instanco pri la progreso de Esperanto en edukado, scienco kaj kulturo, kaj ankaŭ pri ĝia progreso en la lernejoj. Komence de tiu elirpunkto C.E.D. lastatempe faris enketon pri la nombro da ĝeinstruistoj, kiuj instruas aŭ volonte instruas Esperanton en lernejo, kaj due, pri la nomoj de la lernejoj, en kiuj, dum la sezono 1955—56, oni instruas la lingvon. Ĝisdate la enketo montras, ke estas preskaŭ 400 volontuloj inter la instruistaro, kaj ke ekzistas pli ol 140 lernejoj, en kiuj oni instruas la internacian lingvon.

De tempo al tempo anoncis sin diversaj Esperantistaj instruistoj, kiuj, kiel perantoj, volonte helpas al pli vastaj kontaktoj inter la diversaj lernejoj, kie oni instruas la lingvon. Pro tiu bonvola kaj sindona helpo la movado estu sincere danka. Sed por pligrandigi tiujn kontaktojn kaj doni al individuaj instruistoj la eblecon elekti por si mem lernejojn, kun kiuj ili deziras starigi kontaktojn, C.E.D. nun publikigas liston de la koncernaj lernejoj, akiritan dum la lastatempa enketo. Tion ĝi faras kun la espero ke la instruistaro vaste utiligos informojn por starigi la deziratajn interlernejajn kontaktojn por si mem kaj por la gelernantoj. Estas tre dezirinde, ke la ĝejunuloj, kiuj ĵus ellernis la lingvon aŭ ĝiajn fundamentajn elementojn, kontaktiĝu kaj utiligu la novan scion almenaŭ por korespondado. Tiujn kontaktojn oni povus starigi eble antaŭ la somera ferio.

Ĝis nun, per la jam starigitaj interrilatoj kaj per la spertoj akiritaj de diversaj lernejoj, ni havas iom da informo rilate al la korespondado, al la efiko de la lernado sur la aliaj lernejoj objektoj, precipe geografio, al la interŝanĝo de informoj personaj kaj ĝeneralaj, kaj ankaŭ pri kelkaj kulturaj eventoj kaj festoj, kiuj estas la rezultoj de tiuj interlernejaj kontaktoj. Pri tiuj aktivecoj ni havas iom da informo, sed ĝis nun ne sufiĉan. Povas esti, ke ekzistas aliaj aktivecoj kaj bonaj metodoj por progresigi kaj plifirmigi la rezultojn akiritajn pere de nia lingvo. Tiu grava problemo estas diskutenda de ĉiuj Esperantistaj ĝeinstruistoj kaj edukistoj.

En la U.K. en Kopenhago, la programo enhavos ĝuste tiun temon por pritraktado, en la kadro

de la Unua Sekcio, kaj sub la titolo „Esperanto en la Edukado”. Tie ni esperas diskuti pri la nuna stato de Esperanto inter lernejoj, kaj ankaŭ inter plenkreskuloj. Ni intencas trakti ankaŭ la efikon de la lernado de Esperanto je la mensa evoluo de la lernintoj. Kaj fine, ni devas eltrovi ĉu ekzistas pliaj eblecoj por la larĝigo de la lernado de Esperanto en la lernejoj. Tiuj temoj bezonas multe da pripensado, do ni esperas ke la kongresanoj ĉeestos multnombro la kunvenojn de la Unua Sekcio, ne nur por diskuti pri la diversaj flankoj de la problemo, sed ankaŭ por sciigi pri siaj propraj valoraj spertoj sur ĉi tiu kampo. Kiel jam dirite, la rezolucio de Montevideo estas la elirpunkto, sed nur la elirpunkto. Antaŭ ni staras la laboro,

D. K.

TABELO DE LERNEJOJ

Klarigo: Kolono 2 — E (elementa) 10—13 j; M (mezgrada) 13—18 j; A (alta) 18 j.

Kolono 3 — a = junuloj; b = junulinoj.

× signifas, ke a/b ne troviĝas en tiu lernejo.

Lernejo kaj adreso	× 1. Tipo	2. Nombro	
		a	b
AŬSTRUJJO			
Borrmäun lernejo, Salzburg	M	23	0
Technische Hochschule, Wien	A	2	0
Bundes Blindeninstitut, Wien	E	5	5
BELGUJJO			
Koninklijk Atheneum, Eeklo	M	9	16
BRITUJJO			
Girls' Grammar School, Bishop Auckland	M	×	25
Boys' Grammar School, Bishop Auckland	M	13	×
College of Technology & Commerce, Bournemouth	A	3	12
Portchester Road M.S. School, Bournemouth	M	12	0
Buckhaven Mining School, Buckhaven, Fife	E	7	7
Northern Counties Training College, Hexham	A	×	40
North London Literary Institute, London N.W. 10	M	6	16
Audenshaw C.E. School, Manchester	E	2	4
Egerton Park School, Denton, Manchester	M	150	150
Northampton Grammar School, Northampton	M	10	×
Great Barr Comprehensive School, Birmingham	M	9	19
Tinkers Farm Modern Girls' School, Birmingham	M	×	160
Elliston County Secondary School, Cleethorpes	M	100	×
Crowle County School, Crowle, nr. Scunthorpe	M	110	×
Temple Boys' School, Rochester, Kent	E	70	×
College for the Blind, Rowton Castle, nr. Shrewsbury	M	22	23
ĈEĤOSLOVAKUJJO			
Dum osvĕty, Náchod	M	21	6
Zdravotní škola, Svitavy	M	×	20
DANLANDO			
Vibenshus skole, København	M	×	21

FINNLANDO

Kansakoulu, Pori	E	24	10
Käppärän koulu, Pori	E	26	×
Letkun koulu, Tammela	E	3	8

FRANCIJUO

Vilaža lernejo, Balaruc les Bains	E	3	3
Collège J. H. Fabu, Carpentras	M	varias	
Cours complémentaire, Coulommiers	M	0	3
Collège de jeunes filles, Laon	M	×	3
Moderna Kolegio por junulinoj, Luçon	M	×	8
Ecole publique de garçons, Marseille	E	36	×
Cours complémentaire mixte, Mézidon	M	30	51
Lycée Turquet, 69 rue Turbigo, Paris	M	21	×
Lycée Louis le grand, rue St. Jacques 5, Paris	M	5	×
Ecole E. Zola, Rochefort-sur-mer	M	15	×
Collège classique de Royan, Royan	M	5	10
Ecole publique de garçons, St. George d'Oléron	E	4	×
Ecole M. Audour, Sancoins	M	×	26
Ecole publique, Téméven	E	8	10
Elementa lernejo, Villers Allerand	E	13	18
Ecoles des jeunes aveugles, Villeurbanne	E	4	0
Ecole de filles de Muret, Muret	E	×	10

GERMANUJO (okcidenta)

Volksschule Silberberg, Geesthacht	E	10	10
Volkshochschulen, Gladbeck	M	10	4
Schule am Brink 7, Hamburg	M	20	×
Staatliche Abend-Handels und Fremdsprachenschule, Hamburg	M	15	15
Kreisberufs u. Handelsschule, Heide	M	50	50
Volkshochschulen, Marl-Hüls	M	20	6
Mittelschule, Northeim i. Hannover	M	7	12
Volkshochschule, Wiesbaden	M	6	6

HISPANUJO

Instituto de Culture y Educación para la Mujer, Moyá (Barcelona)	M	×	10
--	---	---	----

HUNGARUJO

Gyarvarosi alt. iskola, Pécs	M	3	12
------------------------------	---	---	----

ITALUJO

Instituto Magistrale, Alessandria	M	18	14
Scuola Facchinetti, Buste Arsizio	M	13	13
Scuola media statale „G. Carducci“, Carrara	M	12	15
Liceo en Gallarate, Gallarate	M	11	10
Liceo „Pellegrino Rossi“, Massa	M	30	25
Instituto professionale di stato, Massa	M	20	25
Scuola tecnica comm. stat. „Marignoni“, Milano	M	×	21
Scuola media statale „Col di Lana“, Roma	M	0	12
Scienza Liceo „G. Ferraris“, Varese	M	37	38

JAPANUJO

Ikuno altlernejo, Osaka	M	12	31
Joši Bijucu Daigaku, Tokio	A	×	120
Waseda Daigaku, Tokio	A	50	6

JUGOSLAVUJO

I. Ekonomska srednja škola, Beograd	M	10	25
Škola učenika u privredi, Cr 9, Beograd	M	53	×
Narodna osmogodišnja škola, Kalinovac	M	9	8
Srednja ekonomska škola, Pula	M	0	16
Gimnazija „Branko Semelic“, Pula	M	16	17
Srednja ekonomska škola, Pula	M	5	15
Narodna osmogodišnja škola, Split	E	10	12
Osmogodišnja škola „Kokai Imre“, Temerin	E	34	40
Narodna škola I, Zagreb	E	30	13
Osmogodišnja škola III, Vinkovci	E	13	32

Srednja ekonomska škola, Makarska	M	20	42
Gimnazija „Zlatko Šnajder“ Slav. Brod	M	7	8
Osmogodišnja škola III, Slav. Brod	E	34	13
Vjezbaonica pri Učiteljskoj školi, Slav. Brod	E	16	19
Učiteljska škola, Slav. Brod	M	8	54
Ekonomska fakultet, Zagreb	A	6	6
Zenska stručna škola, Kruševac, Serbujo	M		
Gimnazija, Kruševac, Serbujo	M		
Učiteljska škola, Kruševac, Serbujo	M	13	22
Osnovna škola (Elementa I), Kruševac, Serbujo	E		
Potpuna gimnazija „Uroš Predić Pančevo, Serbujo	M	40	60
Šestogodišnja škola, Roanda p. Sedčare, Serbujo	E	5	12
Učiteljske, Celje, Slovenujo	M	6	21
I Vajenska škola raznih strok, Celje, Slovenujo	M	20	5
II Vajenska škola raznih strok, Celje, Slovenujo	M	20	10
Vajen, škola raznih strok pri Deškom vzgajališču, Gor. Logatec Slovenujo	M	25	×
Slovensko učiteljske, Koper, Slovenujo	M	13	35
Učiteljske, Ljubljana, Slovenujo	M	7	21
Klasična gimnazija, Ljubljana Slovenujo	M	16	10
Nizja gimnazija pri Zavodu za slepo mladino, Ljubljana	M	8	6
Ekonomska sred. škola, Ljubljana, Slovenujo	M	32	32
Administrativna škola, Ljubljana, Slovenujo	M	×	35
Učiteljske, Maribor, Slovenujo	M	4	25
Administrativna škola, Maribor, Slovenujo	M	1	11
Zelez. industrij. škola, Maribor, Slovenujo	M	40	0
Vajenska škola raznih strok, Maribor, Slovenujo	M	7	5
Vajen, škola besne stroke, Maribor, Slovenujo	M	6	×
Gimnazija, Postojna, Slovenujo	M	3	7
Gimnazija kaj Vajenska škola raznih strok, Ptuj, Slovenujo	M	11	×
Nizja gimnazija, Rogaška Slatina, Slovenujo	M	24	13
Obrtna škola, Rogaška Slatina, Slovenujo	M	5	2
Steklarska škola, Rogaška Slatina, Slovenujo	M	7	2
Osmogodišnja škola „Josif Attila“, Novi Sad, Vojvodino	E	19	23
Učiteljska škola, Novi Sad, Vojvodino	M	60	60
Viša mešovita gimnazija, Srem, Mitrovica, Vojvodino	M	125	125
Viša mešovita gimnazija, Sombor, Vojvodino	M	30	30
Mešovita učitelj škola, Sombor, Vojvodino	M	15	15
Učiteljska škola sa madjar materinjim jezikom, Subotica, Vojvodino	M	8	12
Osmogodišnja škola, Zamaski Dol, Motorun, Istrio	E	6	7
Škola ucemika u. privredi, Beograd	M	25	25
Technički fakulteti Beograd univ., Beograd	A	12	0
Osmogodišnja škola „Cirilo i Metodije“, Beograd	M	20	20
Ekonomska srednja škola, Beograd	M	14	14

KANADO

Rose Valley High School, Rose Valley	M	4	8
--------------------------------------	---	---	---

KANARIAJ INSULOJ

Grupo Escolar „Duggy“, Santa Cruz de Tenerife	E	10	10
---	---	----	----

MAROKO

Cours complémentaire de l'Ecole G & M
Leven de l'Alliance Israelite Universel,
Marrakech M 10 20

MEKSIKIO

Fakultad de Ciencias, Univ. nacional,
Mexico D.F. A 9 10

NEDERLANDO

Van der Leeuw School, Alkmaar E 3 5
Rochdale School, Alkmaar E 10 24

Gemeentelijke Univ. van Amsterdam,
Amsterdam A 15 5

Gemeentelijke Kweekschool voor Onder-
wijzers, Amsterdam M 3 6

Gereformeerde Kweekschool,
Amsterdam M 7 6

Rijkskweekschool voor Onderwijzers
Arnhem M 8 10

„Van Reenen" school, Bergen E 4 10

Utrechts Montessori Lyceum, De Bilt M 0 2

Christelijke school voor Lager Onder-
wijs, Ede E 8 19

Openbare Montessori school, Hago
Chr. Inst. „Groen van Prinsterer",
Hilversum E 20 17

NOVZELANDO

Tauranga College, Tauranga M 4 6

NORVEGUJO

Jorhus folkshogkule, Fannrem M 10 9

Dalen blindeskole, Trondheim E 7 7

Aars & Voss skole, Oslo M 11 9

SVISLANDO

Kaufmännische Berufsschule, Aarau M 11 13

Kaufmännische Berufsschule, Baden M 8 10

Ecole supérieure de commerce,
Neuchâtel M 11 12

USONO

Indiana University, Bloomington A 5 5

San Diego evening high school,
San Diego M 24 24

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1956

Stato je la 31-a de marto

Konkurso I

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Hispanujo	1825	1710	93,15
2. Nederlando	5074	4684	92,31
3. Svislando	1740	1550	89,09
4. Britujo	7608	6659	87,56
5. Francujo	5869	4984	84,92
6. Belgujo	2135	1801	84,35
7. Svedujo	6893	5635	81,74
8. Finnlando	2872	2270	79,04
9. Italujo	3025	1980	65,45
10. Jugoslavio	2629	1690	64,28
11. Danlando	2765	1650	59,67
12. Norvegujo	2318	1285	55,43
13. Brazilo	6820	3660	53,66
14. Usono	3352	1665	49,67
15. Germanujo	6986	3440	49,24

Konkurso II

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Kanado	345	370	107,21
2. Portugalujo	495	475	95,95
3. Islando	330	310	93,93
4. Maroko	937	805	85,91
5. Urugvajo	330	275	83,33
6. Aŭstralio	1145	870	75,98
7. Japanujo	1182	885	74,87
8. Izraelo	330	180	57,57
9. Aŭstrujo	1485	805	54,20
10. Sudafriko	305	160	52,45
11. Meksikio	250	120	48,—
12. Nov-Zelando	854	375	43,91
13. Irlando	250	55	22,—

Festaga Konkurso

Alvenis solvoj el ne malpli ol 30 lan-
doj. La unua kaj dua gajnintoj ambaŭ
havis la jenan solvon:

IMPLIKI
IZOLILO
PIEDIRI
LINILO
INTRIGI
DISLIMI
ILUMINI
KOMISII

La gajnintoj, kiel ankaŭ pluraj aliaj,
prezentis aliajn solvojn kun pli altaj
poentsumoj, sed ĉar ni tre rigore atentis
ke la vortoj nepre devas troviĝi en
plena vortaro, ni devis malakcepti ilin.
Nia celo ja estis devigi la konkursantojn
deligente pridemandi la vortaron kun la
kaŝita intenco ke ĉiu je la foliumado
pliriĉigu sian ĝeneralan vortprovizon.
Jen la rezulto:

1-a premio (laŭ lotumado): S-ro R.
Iserentant, Brugge (Belg.) 350 p.

2-a premio (laŭ lotumado): S-ro J.
Derieuw, Antverpeno (Belg.) 350 p.

3-a premio: S-ro V. Marcone, Varazze
(Ital.) 348 p.

4-a premio (laŭ lotumado): S-ro C.
Graversen, Esbjerg (Dan.) 346 p.

5-a premio (laŭ lotumado): S-ro Jon
B. Willarson, Milwaukee (Usono) 346 p.

Kun gratulo al la gajnintoj kaj kun
komplimento al ĉiuj diligentaj konkur-
sintoj.
La Konkursa Komitato.

La Ilustrita Vortaro

Aldone al nia recenzo pri la
„Ilustrita Vortaro" de Francisko
Azorin k.a., ni opinias utile re-
presigi sube, el „L'Esperanto"
(Italujo), kelkajn komentojn de
Prof. Clelia Conterno, kiuj ŝajnas
al ni atentindaj:

Cetere, kion diri? Ne estas in-
dikate, en kiu universitata fako
s-ro Azorin siatempe instruis, kaj
li estas arkitekto. Neniu, nenie
en la mondo, kuraĝus verki kaj
prezenti al la publiko vortaron,

aŭ eĉ gramatiketon, pri sia propra,
gepatra lingvo, ne havante sufiĉan
kompetentecon aŭ eĉ sufiĉe altan
nivelon en ĝi. Sed rilate al Es-
peranto ĉio estas farebla, ĉio estas
tolerata. Ĉu ni volas reduktiĝi al
vilaĝeto, kie rajtas esti konsidera-
taj kompetentuloj pri medicino la
akuŝistino, pri poezio la popolin-
struisto, pri klero la vilaĝestro
(elementa licenco), kaj pri ling-
vistiko ĉiu ajn? Aŭ, ĉu ni estas
ĉiuj geniuloj kiel Zamenhof, es-
cepto kiu ne devas iĝi leĝo? T.n.
„pionireco" ne rajtigas nin al tio:
alie, ni ne priploru, poste, forirojn
el nia bela familio kiel estis tiuj
de Kabe aŭ de Bruno Migliorini,
kiuj lasis, ili diris aŭ direktis, aron
de neseriozaj nekompetentuloj aŭ
de malaltnivelaj preskaŭfakuloj.
Mi tre timas, ke ili pravis...

Clelia Conterno

JUGOSLAVIO SERĈAS KULTURAJN RILATOJN PERE DE ESPERANTO

La lastaj kelkaj jaroj fariĝis tre gravaj en la vojo al la oficiala akceptado de Esperanto fare de internaciaj kaj landaj instancoj. La sukcesoj en tiu senco pravigas niajn klopodojn kaj instigas al plua laborado.

En nia strebado al la ĝenerala enkonduko de nia lingvo en la internaciajn interrilatojn ni certe havas la plej grandajn ŝancojn en la kampo de kulturaj rilatoj inter la nacioj, ĉar tie ne regas tiom fortaj egoismaj tendencoj kiel en la politiko, kaj ankaŭ ne la profitavido kiel en la komerco.

Nova pruvo de tiu ĉi aserto estas la fakto, ke la Registaro de Jugoslavio pere de sia Komisiono por kulturaj rilatoj kun Eksterlando decidis serĉi kontaktojn kun similaj institucioj en aliaj landoj pere de Esperanto, kaj invitas ilin al la adopto de la Internacia Lingvo en la reciprokaj rilatoj. Tiun ĉi gravan paŝon la nomita instanco entreprenis post detala pristudo de la progresoj jam atingitaj de Esperanto en la progresigo de la kulturo, kaj kun la konvinko, ke la historia momento estas matura por tia paŝo.

Jen la dokumento kiu pri tiu decido parolas:

(Blazono de Jugoslavio)

Komisiono
por Kulturaj Rilatoj
kun Eksterlando
No 628

Beograd, Birĉaninova 6
4-an de februaro 1956

Al la ŝtataj institucioj por kulturaj interrilatoj

Ĉar UNESKO dum sia IX Konferenco, okazinta en Montevideo dum novembro kaj decembro 1954, adoptis rezolucion laŭ kiu ĝi konsideras, ke Esperanto estas efika rimedo por la evoluo de la kulturaj kaj sciencaj interrilatoj inter la popoloj, la Komisiono por kulturaj rilatoj kun Eksterlando de la Popola Federala Respubliko Jugoslavio esprimas sian konvinkon, ke tiu lingvo, simpla kaj neŭtrala, povos en la proksima estonteco fariĝi utila instrumento por la alproksimiĝo kaj reciproka interkonigiĝo de la popoloj dividitaj per lingvaj baroj.

Pro tio ni esprimas la deziron, ke Esperanto

fariĝu helpa ilo de interkompreniĝo inter la popoloj sur la kultura kampo, kaj ni invitas la ŝtatajn instituciojn por kulturaj interrilatoj ekagi en tiu senco. Ni esperas, ke okaze de sia vojaĝo tra pluraj amikaj landoj la jugoslava verkisto Tibor Sekelj havos la eblecon kontakti la estrojn de la menciitaj Institucioj kaj agi kiel nia interpretisto, en tiu senco, de niaj deziroj.

(Sigelo)

La Prezidanto
Marco Ristiĉ, p.m.

Kompreneble, en la landoj, kiujn mi vizitos, mi klopodos interesigi la ŝtatajn instancojn por kulturaj rilatoj por enkonduki Esperanton en ilian funkciadon. Sed estus dezirinde, ke samtempe ankaŭ aliaj kompetentaj samideanoj en aliaj landoj laboru en la sama senco, ĉar nur tiel la interrilato per Esperanto povos fariĝi realeco.

En kio konsistas la laboro de la Komisiono por kulturaj rilatoj?

Ĝi zorgas pri la alveno de fremdlandaj kolektivaj (ne opaj) artaj ekspozicioj, ŝtataj operaj, teatraj aŭ altnivelaj folkloraj trupoj al Jugoslavio, kaj el Jugoslavio al aliaj landoj. Zorgas pri la interŝanĝo de studentoj kaj kulturlaboristoj kun aliaj landoj. Certigas kontakton de artistoj kaj sciencistoj eksterlandaj kun samfakuloj jugoslavaj, perletere, aŭ okaze de vizito al tiu ĉi lando. Eldonas trimonatan Informan bultenon en angla, franca kaj germana lingvoj, pri la kulturaj aktivecoj en la lando, kaj donas al iu ajn perleteran aŭ buŝan informon pri io ajn kio koncernas la jugoslavan kulturan vivon.

Sendube multaj esperantistoj, verkistoj, pentristoj, muzikistoj, ktp. povus per ŝaga informpeto, serĉo de kontakto, deziresprimado akceli la laboron. Sed ankaŭ estus tre grava laboro atentigi al tiu ĉi alvoko similajn instituciojn en aliaj landoj, kaj instigi ilin respondi en la sama senco kaj en Esperanto. Kompreneble, paralele kun tia ago devos iri ankaŭ la instigo, ke iu oficisto el la Institucio eklernu Esperanton.

Tibor Sekelj

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Auld. La 24an de februaro 1956 naskiĝis al *Meta* kaj *William Auld*, Johnstone, Skotlando, filo *William Roy*.

Conterno. *Clelia* kaj *Cesare Conterno*, Via Vico 10, Torino. Italujo, anoncas la naskiĝon de sia filo *Renato*, la 12an de februaro, 1956.

Geedziĝo

Preston-Rhydderch. La 18an de februaro 1956, ĉe Westbury-on-Trym Baptista Preĝejo, Bristol, Anglujo, geedziĝis *E. M. Preston*, Bristola Vicdelegito de UEA kaj Prezidanto de la Bristola Esperanta Societo, kaj *C. C. Rhydderch*, anino de UEA kaj kontrolistino de la Bristola Societo. Pastro *W. J. Downes* celebris.

NEKROLOGO


Corbisier-Scheerlinck. Mortis pasintjare s-ino *Jeanne Corbisier-Scheerlinck*, Braine-le-Comte, Belgujo, kunfondinto de la Internacia Komisiono „Esperanto kaj Sociologio“, kaj fakdelegitino por socialaj aferoj. Ŝi estis kontorestro pri socialaj leĝoj en la Nacia Banko de Belgujo.

de *Marich. Aŭgusto H. de Marich* mortis 72-jara la 1-an de novembro 1955, en Reit im Winkl, Bavarujo, Germanujo.

DUDEK-KVIN JARCENTOJ DE BUDHISMO

de

Cejlona
Sanghano Njanasatta Thero



Nia samideano C. Nyanasatta,
abato de la Verda Ermitejo en
Bandarawela, Cejlono

Dum la tempo de la 23-a de majo ĝis la fino de tiu ĉi jaro la budhanoj de la tuta mondo festos la Jubileon de 2500 jaroj de budhismo. Laŭ la tradicia kalkulado de la budhana epoko konforme al la paliaj historiaj libroj, estas ĝuste 2500 jaroj post la forpaso de la Budho. Vojaĝo al la lokoj, kie la Budho vivis kaj instruis estas la sopiro de ĉiuj budhanoj, kaj multaj veturos al Norda Hindujo dum tiu ĉi jaro. Kvankam la ĉefaj lokoj estas facile atingeblaj de Bombajo kaj Kalkuto la vojaĝontoj okcidentaj kaj orientaj nepre turnu sin por detalaj informoj al la Maha Bodhi Societo de Hindujo kaj Cejlono. *

Por plej efike klarigi al la esperantistoj la signifon de la Budhana Jubileo, ni ekzamenos la plej gravajn lokojn rilate la vivon de la Budho, kiujn vizitos multnombraj homoj ĉi-jare.

Pasante la nordan landlimon de la Hinda Respubliko, kaj veturante kelkajn kilometrojn tra suda Nepalo, oni trovas Lumbini, la naskiĝlokon de Sidarto Gotamo, antikve parko de altkreskaj arboj; hodiaŭ eĉ ne unu el tiuj arboj ekzistas, kaj oni vidas nur ebenajn rizkampojn. Tamen estas propono restarigi la parkon kun la belaj arboj same kiel ĝi antikve aspektis.

Ĉe Lumbini estas la fama ŝtonkolono starigita laŭ ordono de Asoka, la imperiestro de tuta Hindujo en la tria jarcento antaŭ Kristo. Tiuj el la vizitantoj kiuj kapablas legi la strangajn literojn de la enskribo sur la kolono, senpacience serĉas la faman parton de la enskribo: „Tie ĉi naskiĝis la Budho, la saĝulo el la gento de la Sakjoj.” Al la homamaso la gvidisto klarigas la tutan tekston jene: „Lia Reĝa Moŝto, la Favorato de Dio (Asoka) pilgrimis al tiu ĉi

loko en sia dudeka jaro de regado, ĉar tie ĉi naskiĝis la Budho, la saĝulo el la gento de la Sakjoj, kaj li ordonis, ke tiu ĉi kolono kun enskribo estu starigita tie ĉi por memori la naskiĝon de Budho kaj la pilgrimadon de la reĝo al tiu ĉi loko ...”

Post silenta riverenca meditado ĉe tiu ĉi sankta loko de budhanoj, oni pripensas, ke estis en la plenluna tago de majo, tradicie antaŭ 2580 jaroj, kiam Maha-Maja, la reĝino de Sudhodana, kiu tiam regis la landon de la sakja gento, naskis sian unuan infanon ĝuste en tiu ĉi loko. La kristanaj samideanoj pensas: *Tio ĉi ja estas la budhana Betlehemo!* La naskiĝo okazis dum la veturo de la reĝino de la reĝa urbo *Kapilavastu* (sanskrite: *Kapilavastu*) al *Devadaha*, la urbo de siaj parencoj. Meze de la vojaĝo inter la du urboj la reĝino naskis sian filon, sian unuan infanon, kiu estis destinita fariĝi la mondhonorata instruisto de la nobla vojo al liberiĝo per spirita iluminiĝo. La princo estis nomita Sidharto Gotamo, la plenumo de la deziroj (de la popolo).

Estas interese rimarki ke la ŝtonkolono jam staris pli ol 2200 jarojn, kaj ke la enskribo estis tiel bone gravurita ke eĉ la forpaso de la jaroj ne sukcesis malaperigi ĝin. Origine ĝi estis pli ol 70 futojn alta, kaj devis esti transportita centojn da kilometroj el malproksima ŝtonminejo, kaj tio ja kostis al imperiestro Asoko ne nur kelkajn jarojn sed ankaŭ grandegan sumon da mono! Poste, dum la persekutado de budhanoj kaj detruado de ĉiaj monumentoj budhanaj de aŭ fanatikuloj aŭ invadintoj, ĉu hinduaj, ĉu islamaj, aŭ ĉu sovaĝaj triboj mongolaj el Centra Azio, la kolono estis duone frakasita: la supra parto ankoraŭ ne estis trovita, sed la malsupra parto kun la enskribo kuŝis enterigita ĝis 1896, kiam britaj arkeologoj malkovris ĝin kaj deĉifris la gravuritajn literojn.

* The Maha Bodhi Society of India, 4A, Bankim Chatterjee Calcutta 12, Hindujo.
The Maha Bodhi Society of Ceylon, P.O. Box 250, Colombo, Cejlono.



La Verda Ermitejo, de supre.

Kiam la britoj komencis daŭre administri Hindujojn kaj Cejlonon sub la kontrolo de la reĝa registaro en Londono, sed laŭ la antikvaj leĝoj kaj kutimoj sekularaj kaj religiaj de la indiĝenoj, kleruloj el Britujo kaj aliaj landoj estis invititaj veni Hindujojn por studi la klasikajn lingvojn por traduki la antikvan literaturon pri historio, leĝo, religio kaj iama administrado de tiuj landoj. Tiel la sanskrita kaj palia lingvoj estis malkovritaj kaj studataj de okcidentuloj. Unu el tiuj kleruloj, James Prinsep, ŝtatmonfarejestro en Kalkuto, deĉifris la trian el la malnovaj lingvoj literaturaj, nome la skribsistemon de la enskriboj de Asoko. Dum la unuaj jaroj post la malkovro de la ekzisto de la sanskrita kaj palia lingvoj kun vasta, interesa kaj valorega literaturo, James Prinsep estis longe embarasita pro nekompreneo de kelkaj surskriboj de antikvaj moneroj trovitaj en diversaj partoj de Hindujo. Kiam li akiris unu el tiuj moneroj kun surskribo en la enigmaj literoj de la nekonata lingvo, sed kun greka teksto aliflanke, genia ideo frapis lin: *Eble la enigmaj literoj estas la transliterigo de la greka teksto!* Li legis la misterajn literojn unu post la alia, ĉiam sekvante kaj komparante ilin kun la greka teksto, kaj jen, li efektive deĉifris la novajn literojn. Baldaŭ post tiu ĉi feliĉa okazo, en 1834—35, Prinsep estis la unua okcidenta instruitulo, kiu solvis la misteron de la plej antikvaj enskriboj hindaj sur rokoj en diversaj lokoj de Hindujo. Kiam oni montris al li la reproduktajn de unu el la Asokaj Rok-Ediktojn, kun sia limigita scio de la Asoka brahmi-skribsistemo, li sukcesis deĉifri kaj traduki ĝian enkondukan frazon jene: „*Tiel diris lia favora reĝa moŝto, la amato de Dio.*” De tiu grava tago

por la orientologio pasis multaj jaroj antaŭ ol la okcidentaj arkeologoj en Hindujo, inter siaj multaj malkovraĵoj, malkovris en 1896 la *Lumbini-Kolonon* de Asoko kun ĝia fama legendo rilate la naskiĝon de la Budho. Tiam preskaŭ ĉiuj rok-ediktoj kaj kolonoj kun gravuritaj enskriboj estis jam malkovritaj kaj iliaj tekstoj komprenataj.

Alia loko kiu allogas pilgrimantojn kaj vizitantojn estas kie antikve staris **Kapilavastuo**, la reĝa urbo kie la princo pasis sian junecon. Nun ĝi estas senhoma dezertsimila loko, kie antaŭ 25 jarcentoj estis la hejmo de *Sidhartho Gotamo*, kie li ludis kun siaj kuzoj kaj amikoj, kie li ricevis sian unuan edukadon por siaj venontaj devoj de reĝo de la *Sakjoj*. Tiam estis laŭboj, kie sidis la juna princo kun pacienca *Jasodharo* kun kiu li edziĝis akirinte ŝin en kontesto kun armiloj kaj konkurso en vetludoj kaj militistaj sportoj, ja eĉ konkuro sur ĉevaloj.

La reĝo ne deziris ke la princo vidu iajn mizerojn, do tro apartigis sian filon en reĝa palaco for de la urbo. Tamen la princo volis vidi la urbon, kaj eventuale eliris por vidi ĝin. Li renkontis la alie kaŝitajn signojn de kadukiĝo, malsano kaj morto en la formoj de kaduka maljuna almozulo kaj malsanulo ĉe la flanko de la strato, kaj funebra procesio kun mortinto portata sur portilo kaj senĉerke, laŭ la antikva hinda kutimo. La tri okazintaĵoj, de kiuj la zorgema reĝo ĉiam gardis lin pro timo perdi sian filon laŭ *profetaĵo de saĝuloj ĉe la naskiĝo*, tre dolorige influis la princon, montrante al li la suferon de homa vivo. Poste, lin forte impresis la kvara sceno, en kiu li renkontis senhejman monaĥon, kiu deklaris, ke li serĉas la vojon el sufero al venko de ĉia sufero kaj de nescio pri ĝi: nome pripensante la originon de sufero, ĝian ĉeson, kaj sekvante la vojon al liberiĝo. Vidinte la „*kvar antaŭsignojn*” profetitajn, li decidis abdiki sian princon rajton, forlasi la urbon kaj serĉi la vojon al liberiĝo. En la nokto li silente forlasis la reĝan palacon de *Kapilavastuo*, kaj prenis sian ĉevalon por la *fina rajdo en senhejmecon*. Ĉi tiu fina rajdo daŭris la tutan nokton, ĉar li haltis nur post la atingo de la malproksima flanko de la rivero *Anoma*, longan distancon de sia hejmo kaj en la regno de alia reĝo, kie la ŝtatoficistoj de reĝo *Sudhodano* ne povis alveni




ĝustetempem por persvadi la princon ke li revenu al sia reĝa patro. Tie ĉi, do, en la reĝlando de *Magadha*, la princo fortranĉis siajn junecajn buklojn kaj barbon, kaj en la oranĝkolora simpla vesto de senhejma religia studento pilgrimanta, li iris sola al la reĝa urbo *Raĝagaha*, por tie sekvi sian serĉadon de iluminiĝo.

Ci tio nun kondukas nin al *Uruvela*, kaj poste al la plej fama sankta loko budhana, *Budha Gaja*.

Ĉe *Uruvela* la eksprinco studis unue sub *Alara-Kalamo* kaj poste sub *Udraka-Ramaputro*, du maljunaj saĝuloj, instruistoj de mistiko. Sed la asketo *Gotamo* malkontentiĝis rilate la rezultojn de studado, kaj poste aliĝis al grupo de kvin asketoj, en kies societo la reĝa ermito pasigis ses jarojn en *Uruvela*, dediĉante sin al la nun tute nekompreneble severaj specoj de asketismo, al kutimigante sin al senfinaj fastoj, absoluta soleco, ĉeso de spirado, sendormeco kaj profunda meditado en silento. Sed kiam li perfekte elkomprenis, ke tiu severa asketismo kaj sintorturo ne kondukas al ilumina liberiĝo, li ĉesis siajn senprofitajn fastojn kaj rekomencis manĝi. La kvin asketaj kunuloj, vidinte tion, forlasis sian ĉefan asketon. Nur tiam la monaĥa ermito *Gotamo* ĝuis perfektan pacon kaj idealan izolecon kun necesa mensa sano kaj forto.

Do, ĉe *Budha Gajao*, proksime de *Uruvelo*, koncentriĝinte kun ĉiuj siaj fortoj kaj kapabloj mensaj kaj spiritaĵaj, li tiam atingis, eltrovis aŭ malkovris la *Mezan Vojon* inter la du ekstremoj de sinturmentado kaj troa ĝuo de sensaj plezuroj, la vojon, kiu kondukas al perfekta liberiĝo per iluminiĝo spirita. Tie ĉi, do, sub la fama *Bodhi-arbo*, la Arbo de la Ilumino, la *Bodhiulo* (estonta Budho) fariĝis perfekta Budho per sia atingado de la plej supera iluminiĝo, laŭ la budhana terminaro, nesuperebla en la mondo.

Sud la *Bodhi-arbo*, la profundaj veroj kaj misteroj pri vivo kaj sufero, ilia origino, ĉeso aŭ estingo, kaj la vojo al liberiĝo, malkaŝiĝis aŭ senvaliĝis en perfekta koncentriĝo spirita de la puraj kaj fortaj menso kaj animo de la Budho. En tiu ĉi loko li decidis malkaŝi al siaj iamaj kunuloj, la kvin asketoj, la plenan veron atingitan dum tiu decida nokto. La ĉefaj solenaj celebradoj de la *Budhana Jubileo* okazos ja tie ĉi, kaj




La abato sidas ekster la Verda Ermitejo. Apude staras s-ano *Buddhaghosa Anderson*.

la vizitonto nun scias iom pri la graveco de *Budha Gajao*.

Bedaŭrinde la tradicie origina *Bodhi-arbo* ne plu ekzistas, ĉar ĝi disfalis dum la 19-a jarcento. Tamen *arbido*, tranĉaĵo de la malnova arbo, estis plantita, kaj estas ĉi tiu arbo, kiu nun estas la centro de pilgrimado, kaj al kiu budhanoj pilgrimantaj al la sanktaj lokoj unue iras por riverenci la lokon de la Iluminiĝo.

Post la iluminiĝo la sekva okazo estis instrui la malkovritan veron, kaj ĉi tio kondukas nin al Benares, la antikva kaj ĉiam viva kaj grava urbo. Dek kilometrojn de Benares estas la loko de la antikva *Isipatano*, la parko kie la Budho komencis instrui sian *Dharmon* (pali-lingve: *Dhamma*; Instruo) pri la homa sufero, ĝia kaŭzo, liberiĝo kaj la vojo al la liberiĝo de ĉia sufero. Asoka ŝtonkolono pruvas, ke la vizitantoj staras sur grava kaj sankta tero de la budhanoj. Vidante tra 25 jarcentoj, ni povas imagi la Grandan Instruiston de la homaro paroli al siaj unuaj kvin disĉiploj dum sia prediko jene: La du ekstremoj de senbrida ĝuado de sensplezuroj, kaj aliflanke de vanaj sintorturoj asketaj, la malmoblaj, vulgaraĵaj, senprofitaj kaj vanaj, devas esti evitataj de senhejma disĉiplo, kiu serĉas iluminan liberiĝon. La Perfektulo (Budho) nun malkovris la mezvojon inter la du ekstremoj, la vojon, kiu kondukas al kompreno, saĝo, paco, iluminiĝo, liberiĝo kaj Nirvano. Tiu vojo nomiĝas la *Nobla Okera Vojo* kaj konsistas el la ok eroj, nome: pravaj kompreno, pensado, parolo, ago, okupo, klopodo, kontemplado

Specimena paĝo el la libro budhana en Ceflona skribmaniero



kaj medita koncentriĝo. Tiuj ĉi estas la *Kvar Noblaj Veroj pri Sufero*: Naskiĝo, maljuniĝo, kadukiĝo, malsano, morto, malĝojo, lamentado, doloro, ĉagreno kaj malespero estas suferaj. Ĉia sufero estiĝas pro deziro, kiu kondukas al renaskiĝo kaj, kunigita al ĝuo kaj plezuro, ĉiam serĉas novajn objektojn de deziro. Estas tri formoj de deziro, nome la deziro por sensaj plezuroj, por ekzistado kaj neekzistado (sinestingiĝo post morto). La kompleta ĉeso, venko, forlaso de deziro estas la liberiĝo de sufero, kaj la okera vojo de virta vivo, meditado kaj saĝo estas la metodo al atingo de liberiĝo de la sufero.

Post la unuaj predikoj al la kvin disĉiploj kaj aliaj novaliĝintoj, la Budho sendis siajn perfektigintajn disĉiplojn instrui la doktrinion per la fama diro: *Iru disĉiploj pro kompatado al la mondo, pro la bono kaj savo de la mondo, instrui la noblan liberigan instruon, kiu gvidas al paco kaj iluminado!*

Tiam la Budho revenis, al **Uruvelo**, konvertis la tri famajn ermitojn (*la Kassapa'ojn*) kun mil disĉiploj, kaj kun tia sekvantaro li denove vizitis **Raĝagahon** por instrui la reĝon Bimbisaron. Tie la du ĉefaj disĉiploj Sariputro kaj Mogalano kun siaj amikoj aliĝis, kaj kun sia ĉiam kreskanta sekvantaro, la Budho nun vizitis **Kapilavastuon**, la urbon de reĝo Sudhodano, kiu nun kontente aŭskultis al la instruado pri la Leĝo kaj la Vojo malkovrita de la Budho. De Kapilavastuo la Budho revenis al Raĝagaho, poste al Savathio.

Savatthi, moderna Sahet-Mahet, estas la loko, kie dum la vivo de la Budho regis reĝo Pasenadi, fervora sekvanto de la Budho. Proksime de Savathio estis la fama parko **Ĝetavana**, kie la plej malavara subtenanto, Anathapindikio, konstruis la grandan monaĥejon, la favoratan restadejon de la Budho kaj liaj disĉiploj.

Dum 45 jaroj predikis kaj instruis la Budho al aliaj reĝoj, reĝinoj, princoj, princinoj, nobeluloj, militistoj, milionuloj kaj miloj da aliaj gloraj, eĉ se ofte malriĉaj, sekvantoj. Fine, estis de **Vesalio**, la urbo de siaj multaj sindonaj sekvantoj, la princoj kaj nobelularo de la gento de la Liĉhaviroj, ke la Majstro, nun okdekjaraĝa, komencis sian finan veturon. Post sia fina, adiaŭa rigardo al la urbo, la Iluminulo iris al **Pava**. Tie li akceptis la finan almozmanĝon en la domo de sia laika sekvanto, Ĉundo. Poste li daŭris ĝis sia celata loko, **Kusinara**.

Ĉe **Kusinara**, pilgrimantoj kaj aliaj staras ĉe la plej malĝoja sankta loko, kie antaŭ 2500 jaroj forpasis la Budho meze de siaj monaĥaj kaj laikaj disĉiploj kaj sekvantoj. Lia korpo estis kremaciita kun imponaj funebraj ceremonioj similaj al tiuj por la potenca imperiestro de la plej vasta multlanda regno. La restaĵoj de ostpecoj, dentoj, kaj eĉ la cindroj estis dividitaj inter ok regantaj reĝoj, princoj, parencoj aŭ speciale sindonaj laikaj sekvantoj de la Budho, kiu ja estis la filo de reĝo kaj membro de la supera nobelula militista klaso

de antikva Hindujo. La adorantoj de la relikvoj de la Iluminulo konstruis monumentojn por gardi kaj protekti ilin. Ĉe Kusinara estas du monumentoj, unu montranta la tradician lokon de la forpaso, kaj tre granda monumento ĉirkaŭ unu kilometron malproksime de la alia, kiu montras la tradician lokon de la kremacio.

Almenaŭ unu el la originaj monumentoj kun la relikvoj donitaj al la reĝo de la Sakjoj de Kapilavastuo, la fama **Piprava** monumento (ŝtupa) kun relikvoj en urno kun surskribo estis malkovrita en 1898 unu kilometron de la suda landlimo de Nepalo. La konstruaĵo, kaj la relikva urno kun surskribo el tempo antaŭasoka, pruvas sendube la historiecon de la Budho, kaj konfirmas la paliajn dokumentojn pri la vivo kaj instruo de la Iluminulo el la gento de la Sakjoj.

La instruo de la Budho daŭris sian ekziston inter la disĉiploj kaj sekvantoj de la Majstro. Dum la tria jarcento post la Budho, Asoko, la plej fama el la reĝoj de antikva Hindujo, *post naŭzo pri milito kaŭzata de sia invado de la lando de Kalingo*, protektis la budhismon sekve de sia konvertiĝo al ĝi, kaj sub la protekto de tiu potenca imperiestro evoluigis la budhismon al mondreligio. Tiam la budhanaj misioj iris propagandi sian instruon al malproksimaj landoj ĉirkaŭ Hindujo, ne nur al Cejlono, Birmo, Siamo, Himalajaj regionoj, Kaŝmiro kaj Persujo, sed ankaŭ al la grekaj regnoj etendiĝantaj ĝis la Mediteraneo, al Egiptujo kaj Grekujo, eble ankaŭ al Palestino, ĉar Asoko, *la patrono de budhismon*, estis aliancano kaj amiko de la seleucidaj reĝoj de tiama epoko. De tempo al tempo la disĉiploj aranĝis konciliojn por fiksi, difini kaj klarigi la doktrinion kaj forigi erarajn interpretojn de malfacilaj punktoj. Sed spite ĉion, baldaŭ du ĉefaj skoloj evoluigis laŭ iom malsimilaj vojoj kaj principoj. Sed la modernaj adeptoj de la pli ortodoksa **Theravada** kaj la pli evoluita **Mahanaja** vivas kaj kunlaboras tute amikeme kaj pace, kiel decas al la disĉiploj de la princo de paco, la Vekiĝinta Iluminulo.

La theravada skolo de Cejlono, Birmo, Tajlando, Kamboĝo, Laoso kaj Hindujo uzas la palian lingvon por siaj aŭtentikaj kanonaj libroj — la **Tipitaka** — kaj ankaŭ por la komentaria kaj postkomentaria literaturo. La mahajana skolo komence uzis la sanskritan lingvon, proksiman parencon lingvon al la palia, sed nun la naciaj lingvoj de Tibeto, Ĉinujo, Japanujo kaj aliaj mahajanaj landoj estas uzataj, krom ĉinskriba sanskritaĵo, por iliaj tekstoj religiaj kaj liturgiaj. La Tutmonda Budhana Fratara (*World Fellowship of Buddhists*) ekde 1950, la **Sesa Budhana Koncilio** en Ranguno, Birmo (1954—1956), kaj nun la **Jubileo de Dudek-kvin Jarcentoj de Budhismon**, en kiuj partoprenas ĉiuj budhanaj de ambaŭ skoloj, pruvas, ke budhismon vivas, kreskas kaj floras por la feliĉo kaj bono de la tuta mondo.



NOVAJ LIBROJ

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

*— ricevebla ĉe U.E.A.

Kaj ĉe la Belarta Konkurso de UEA en la jaro 1945 Boulton gajnis la ĉefpremiion en originala poezio per sia „Alvoko al Amo”. Leganto, prenu denove la novembran numeron de la revuo Esperanto (paĝo 327) kaj lasu vin ravi de la abundo de sento kaj kunsento en la verko, kie la poetino ne ŝvebas abstrakte super la homaj sortoj, sed en saĝa, per sperto konsekrita kaj komprenema vorto, partoprenas la suferadon de ni ĉiuj. Jen la plej bela vizitkarto kaj rekomendo por la jam antaŭ kelka tempo anoncita libro. Nia atendado estis bone motivita. La realo nun superis la esperojn.

La iom ekscita kaj scivolemon vekanta titolo de la libro resendas al la Plena Vortaro, kiu la muzikterminon „kontralto” difinas kiel „la plej malakutan el la virinaj voĉoj”, do kiel voĉon „ne tre klaran kaj penetrantan”; sed mi asertas, ke la voĉo de la Boulton-poezio estas tre klara, celscia kaj nedusenca, kaj ke ĝi penetras ĝis la fundo de niaj koroj.

Marjorie Boulton estas klera virino de larĝa intelekto kaj alta erudicio. Ŝia profesio de ĉeflektorino pri angla lingvo kaj literaturo certe ne malmulte kontribuis al tio, ke ŝia natura poezia talento vaste disvolviĝis, kaj ĝi ankaŭ ekpisis sin per mirinde riĉa stilo. Sed ŝi en la abundeco de la lingvo moviĝas certa pri si mem, ne deviante al malplena oratorismo.

Mi ne povas ne citi la enkondukan poemon „La triopa memo”, en kiu la aŭtorino trafte portretas sin mem:

*Mi estas tri. La digna lektorino
Kun la krajon' kritika libron legas.
En nigra robo, pri la origino
De l' dramo primitiva ŝi prelegas.*

*Dume, en koro, primitiva dramo
Okazas, ĉiam freŝa kaj terura;
Sub nigra robo brulas nun pro amo
Virino simpla en dezir' tortura.*

*La lektorino pensas. La virino
Baraktas, krias, nur angoron sentas.
Sed la Poet', per arta disciplino,
Observas ilin ambaŭ, kaj komentas.*

Atentu la maltrankvilan balanciĝadon de pesil-vekto, kiu esprimiĝas per la eĥo de la vort-turnoj (nigra robo, primitiva dramo), samvortaj ja, sed je la

dua fojo en tute malsama ilumino; kaj la strebadon al la ekvilibro, kiun ŝi efektivigas kaj atingas per disciplinita kaj celkonscia sindediĉo al la poezio.

La temoj de la libro Kontralte estas variaj kaj estas dividitaj en sep grupojn: Trista tenereco; Unu virina koro; La ora branĉo; Bestoj kaj sezonoj; Fenestro al la mondo; Personoj; El la verda notlibro. Ne mankas bonhumoro (kiu ne ridus super la rondelo pri Akademiano Ivo Rotkviĉ kaj lia prunobrandolo!), kristalaj miniaturnaturbildetoj, draste alarmaj tonoj (Poemoj por Hiroŝimo!)... Sed la gravita centro de la poemaro kuŝas miaopinie en tio, kion mi volus karakterizi kiel *kontrapunkton de la koro kaj cerbo*. La poeziaj ideoj vibras inter la polusoj de arda emocio kaj malvarma intelekto. Frosta duŝo de la racio kaj respektataj deco kaj tradicio ĉiam estingas la jam-jam eruptontan tension de la trobolantaj sensoj; kaj male: la roso de efektiva, profunde homa sento ne lasas sekigi la sobrajn rezonadojn de intelektulo. Malkvieta analizado de virina psiko scenas antaŭ ni, en ĉiam novaj formoj kaj formuloj, sed kun subtono de persona resignacio super la propra vivsorto.

En unu el la cikloj, „Amaraj sonetoj”, troviĝas eble psiko-analiza sloŝilo al la formado de la personeco de l' poetino; kaj samtempe ĝi estas majstra ekzemplo de la versoj fajne rafinitaj; plendoj kaj amaraj vortoj pri la „unua amato”, kies rigoro fatale intervenis en ŝia juna vivo; de unu soneto al la alia amasiĝas ĉiam nove prezentataj argumentoj pri la tragika konflikto, kiu detruis influis ŝian sorton — kaj nur en la lasta, la 126a verso ni ekscias, ke tiu unua amato estis — la patro.

Specialan atenton meritas la unua, en have plej kompakta ciklo „Trista tenereco — Sonetoj el virina kolegio”, kie la poetino aperas en sia civila vivo: en la funkcio de vicestro en instruistina seminario. Inter junaj, nervemaj, maturiĝantaj studentinoj, kie ŝvebas „parfumo de virgeco adoleska”, ŝi edukas, gvidas kaj instruas la junajn homojn, disdonante sin mem...

Marjorie Boulton aŭdace prenas ĉe brulantan temon kaj ofte ĝin montras en

***Kontralte**. Poemaro de Marjorie Boulton. Eldonis Stafeto, Kanariaj Insuloj, 1955. 286 p. Prezo 24 steloj.

En la senlaca eldonejo Stafeto ĵus aperis la kvina verko de la belliteratura serio, Kontralte de Marjorie Boulton. La rapida sinsekvo, en kiu samideano J. Régulo plenumas sian eldonplanon, estas surpriza, despli ke la kvalito de la aperantaj libroj tenas sin sur neordinare alta nivelo. Jen motivo por pliaj esperoj.

La ĵusa libro de la angla poetino estas volumo da originale verkitaj esperantaj poemoj, kiuj vekas nian respekton laŭ multaj flankoj: jam la amplekso: 200 poemoj sur 286 paĝoj (plus enkonduka versa memportreto) atestas pri granda laborenergio de la talenta aŭtorino, kiu skribis sian unuan versaĵon en Esperanto antaŭ tri jaroj. Tamen ne la amplekso estas la ĉefa faktoro en la valoreco de la libro. Ĉiuj legantoj de la esperantaj gazetoj de la lastaj unu-du jaroj bone memoras la multajn sentoplenajn versojn, verkitajn en eminenta, esprimriĉa kaj bonstila Esperanto, kun la subskribo: Marjorie Boulton. En ili vibris pura lirismo aŭ estis traktataj problemoj de la homa vivo laŭ la vidpunkto de virina emocio kaj intelekto. Ĵus antaŭ nelonge nin ravis en la Nica literatura revuo la kortuŝa „Mia filineto”, pri elrevita ido, kiu tamen neniam fariĝos realaĵo, restante „Eterne en la mondo ne-estonta”.

nektima prilumo kaj neordinara perspektivo. Mi aludas precipe la subjektojn de la intima erotiko. Si ne timas vorton trafe reliefigantan la nudecon de la faktoj, tamen sen transpaŝi la limojn de la belgusto. Tial aperas antaŭ ni mondo rigardata per okuloj de amanta, suferanta kaj pardonanta virino.

Ankoraŭ unu plian el la poemoj mi volus ĉi tie reprodukti; la poemon „Buĉojtoj”, kiu efikas draste pro intence inverŝigita vidpunkto kaj apartenas al la plej sukcesintaj pro koncizeco de la esprimo:

*Jen ŝafoj en amas' en veturilo,
En griza lana uniĝformo,
Sub hajla kuglostormo...*

*Povraj ŝafoj!
Vi en humilo
El viaj verdaj domoj
Iras al mort' sen epitaĵoj
Kvazaŭ vi estus homoj.*

Sed mi ne povas fini sen almenaŭ skizi la bonhumoran flankon de la libro. En la poemo „Mi lernas ludi la bekluton” la aŭtorino insistas pri sia mallerteco en la muziko, kiun ŝi tamen tre amas, kaj „kun katoj ĝuas plej grandan sukceson” kaj miaŭas tiel, ke ŝi ne mirus, se la „Granda Katestro kun ministroj” sopirus sub ŝia fenestro.

Kiel vivas la lingvo sub la plumo de Boulton komparu ekzemple el la amuza „Plendeto pri malgravajtoj”:

*Mi rigardas sen aprobo
Makulon grasan sur la robo.
Kial ne striki?
Mi devas ŝiki, piki, triki...*

*Ni estas sklavo
De niaj havoj —
Butono-monotono,
Fliĉo-kompliko
Lavo-malraŭvo!*

Kun granda plezuro vi legos tiun ĉi novan libron, kiu apartenas al la plej elstaraj inter la originala poezio de nia lingvo. Jen plia pruvo, ke naskiĝas memstara kulturo internacia.

La aranĝo kaj ekipo de la libro estas modelaj; la kovrilon desegnis John Hartley; enestas portreto de la aŭtorino. Neniu preseraro ĝenas la ĝuon de la leganto.

Pump

Esperanto-sveda vortaro de Paul Nylén, eldonis Eldona Societo Esperanto, Stokholmo 19, poŝtfako 19071, 267 klare presitaj paĝoj, plaĉe bindita, prezo sv. kr. 12.

Kun vera plezuro oni foliumas tiun ĉi bonegan libron kompilitan kun sperta helpo de nia samideano Birger Gerdman. Kvankam nia nestoro Nylén estas fidela fundamentisto, li enlistigis ankaŭ neologismojn parte evitindajn, por ke tekstoj de tro inventemaj aŭtoroj estu legeblaj; sed feliĉe Nylén signis per la litero „K” la vortojn de la Kalocsay-skolo.

Mi iomete bedaŭras, ke oni mencias malbonajn formojn, kiujn dum la kriza periodo Zamenhof nur pro sia cedemo

kaj pacemo toleris, kvankam ili estas kontraŭ la strukturo de la lingvo. La aldono de -n post prepozicio „en”, ekzemple, signifas aldonon al la prepozicio kaj eviton de du prepozicioj antaŭ unu substantivo: „en la ĉambro” staras anstataŭ „al en la ĉambro”, kaj tial la frazo „estas pli facile por kamelo iri tra la trueto de kudrilo” estas simple erara kaj ne „speciale akcentas” la movon.

Anstataŭ la formo: „vitameno” en la eldono 1933, la nova eldono nun diras „vitamino”, kiel diras la Plena Vortaro kaj la Medicina Vortaro de Dro Briquet, kvankam ja estus bone eviti kiel finaĵon „-ino”, kiu indikas la inan sekson. Butin en sia E-germana vortaro diras „vitameno”.

Entute, ni povas gratuli niajn svedajn amikojn, ke ili havas tiun bonegan kaj enhavriĉan novan vortaron, kaj ni admiras la aŭtoron (nask. 1870) pro la granda laboro plenumita en lia aĝo!

Oscar Bünemann.

Sekai no kodomo No. 9, Nishi-Yoroppa Hen No. 1 Furanso. „Children of the World” Series, No. 9. Western Europe, No. 1, France. Eldonita (en japana lingvo) de Neibonsya Eldona Kompanio, Tokyo, 1955.

La volumo en la serio, „Infanoj de la Mondo” pritraktanta Francujon estas signifohava verko, kiun ni ŝaldas al la kunlaborado de multaj volontuloj. La celo estas diri al la japanaj infanoj, kion la infanoj de Francujo pensas, kiel ili vivas, kaj per tiu metodo profundigi internacian interkompreniĝon. Miaopinie tiu celo inde efektiviĝis ĉe la eldonistoj, Neibonsya de Tokyo, dank’ al la klopodoj de tiuj, kiuj sindone helpis.

Nun, mi klarigu mallonge la konturon de ĉi tiu libro. Multaj verketoj, kolektitaj el la tuta Francujo estas dividitaj jene: — enkonduko al Francujo, infanoj de la montoj, infanoj de la vilaĝoj, infanoj de la urboj, infanoj de la maro, infanoj de la minejoj, kaj „la milito kaj infanoj”. En ĉiu sekcio, la liberaj verketoj de la francaj infanoj vive esprimas kion ili opinias kaj kiel ili vivas. En la lasta sekcio, „la milito kaj infanoj”, precizaj impresoj pri la germana invado kaj la faroj de germanaj soldatoj estas priskribitaj laŭ la okuloj de infanoj. Ĉi tiu parto eble estas necesa laŭ vidpunkto de la vero, sed iuj plenaĝaj legantoj povus dubi pri ĝia taŭgeco en volumo de tia serio.

Multaj priskriboj de la loka vivo, sociaj moroj kaj la topografio enmensegigas vere viglan bildon de Francujo por la malgrandaj legantoj. Helpa estas ankaŭ por tiuj, kiuj neniam antaŭe aŭdis pri Francujo, la ĝenerala enkonduko komence de la libro. Sur preskaŭ ĉiu paĝo troviĝas bildoj, desegnaĵoj, mapoj kaj fotografajoj, kiuj havas multe da intereso ankaŭ por plenaĝuloj.

Fine la libro estas grava precipe ĉar ĝi estas „internacia” produktaĵo. Sen la entuziasma helpo de miloj da francaj infanoj, geinstruistoj, gepatroj, kaj francaj kaj japanaj Esperantistoj, la libro

efektive ne povis aperi. Kiam ni konstatas, ke la volumo estas unu el serio de 15, ĉiu pritraktanta po unu lando (aŭ landgrupo), ni devas gratuli la stabon de Neibonsya Eldonejo (kiu enalkulas iujn Esperantistojn) pro ilia vizio, kaj pro la bonega maniero laŭ kiu ili kaj la multaj volontuloj realigis tiun idealon.

Sonoko Strong

***Esperanto-Schlüssel.** Limburg a.d. Lahn, 1954. 32 p. Prezo 30 fenigoj.

Antaŭnelonge aŭdiĝis timaj avertoj, ke la stoko de la famaj ĉefeĉaj ŝlosiloj elĉerpiĝas, kaj ke pro altaj preskostoj minacas ekmanco de tiu bonega propagandilo. La 6a eldono de la germana ŝlosilo en 10,000 ekzempleroj forigas tiun danĝeron sur unu sektoro, sed bedaŭrinde ne povas esti rigardata kiel aŭguro de pli bona estonteco. La germana ŝlosilo povis reapari pro sufiĉa forto de la movado en germanlingvaj landoj; la vera problemoj tamen estas trovi rimedojn por iniciati propagandon en landoj, kie la movado ne ekzistas, aŭ estas tro malforta por financi la eldonon.

La nova germana ŝlosilo — evidente por eviti koston de kompostado — estas kopio de la kvina eldono aperinta en Svisujo en 1942. Rezulte tamen la fina ĉapitro de la ŝlosilo eldonita en 1954 informas la estontan rekruton, ke skismo inter UEA kaj IEL daŭras plu, ke la lasta kongreso okazis en 1939, kaj ke la Svisa Esp. Asocio estas reprezenta centro por germanlingvaj landoj (p. 31-32) — ĉio ĉi kontraste al la pli modernaj faktoj sur la du lastaj kovrilpaĝoj. Ŝajnas, ke tamen valorus ŝanĝi la du anakronismajn paĝojn, eĉ se tio kaŭzas aldonajn kostojn. En estontaj eldonoj de ŝlosiloj oni devos ŝanĝi ankaŭ la frontpaĝan tekston. Ĝi estis bona por la intermilita periodo, kiam la deklaro de Grupo de francaj sciencistoj el 1921 estis supera aŭtoritata opinio pri Esperanto. Nun la frontan paĝon certe devos okupi la decido de UNESKO kaj ju pli frue aperos novaj eldonoj de la ŝlosiloj, des pli grandajn avantaĝojn ni akiras el tiu oficiala agnosko de la kultura valoro de nia movado.

M. Waysblum

Nils Ferlin

MISE

*Venas luno kaj svenas sun',
revo gvidis nin mise.
Revo de nia konvala jun'
gvidis nin ĉiam mise.
Cindrajn vastojn vi vagu plu,
kardojn tretu kun trua ŝu'.
— Revo de via konvala jun'
gvidis vin multe mise.*

El la sveda trad.:

Magda Carlsson

NIA FORUMO

ĈU LA ESPERANTISTARO DEVAS TOLERI TION?

(Malfermita letero al E.A.N.A.)

Mi ne intencas aludi al la fakto, ke s-ro G. A. Connor plurfoje menciis min, ĉu rekte ĉu nerekte, en siaj atakoj al diversaj elstaraj esperantistoj kaj U.E.A. mem, dum la lastaj kelkaj jaroj. Tiuj atakoj ja evidente estas rezulto de persekutmanio, de kiu s-ro Connor suferas, kaj per kiu li klopodas infekti la esperantistaron. Neniam mi intencis respondi al tiaj mencioj, ĉar la esperantistoj bone komprenas, ke tiu, kiu vere laboras por la Movado, ĉiam trovas ion pli gravan por fari, ol respondi mia atakojn de manuloj. Tio restas inter ni, esperantistoj.

Sed okazis io pli grava, io, kio eliras el la kadro de la „intersamideana“ klado, kaj mi konsideras mia nepra devo senmaskigi la „samideanecan“ agadon de s-ro Connor.

En la jaro 1950, post dekjara intensa kaj sukcesplena poresperanta agado en Sudameriko, mi decidis vojaĝi al Usono, por ankaŭ tie starigi min je la dispono de la bezonoj de la Movado. Pri tio mi informis S-ron Connor, kiel reprezentanton de E.A.N.A. Li respondis al mi, ke li ne havos tempon por okupiĝi pri mi(!). Samtempe li havis sufiĉe da tempo denunci min kiel danĝeran „komuniston“ al la aŭtoritatoj de sia lando, kiuj pro tio ne permesis al mi eniri en Usonon. Estas interese menci, ke li ne timis la komunistigan influon ekzemple de la Soveta ambasadoro kun cento da siaj kunlaborantoj loĝantaj en Vaŝingtono, sed li vidis la grandan danĝeron ĝuste en mi, kiu neniam apartenis al iu ajn politika partio, neniam balotis, neniam partoprenis iun ajn politikan agadon, nek iam estis vizitinta landon kun komunisto reĝimo.

Sed ni ne tro akre juĝu tiun ĉi „samideanecan“ agon de S-ro Connor. Al li ne konvenis ke komitatano de U.E.A. vidu de proksime lian „mastrumadon“ en E.A.N.A., kaj li devis entrepreni ion por malebligi tion. Lia „pura“ menso sugestis al li falsan polican denuncon.

Mi jam delonge forĝesis tion kiam subite aperis io nova. Antaŭ nelonge, kiam mi reiris al Grekujo, oni informis min, ke la Policestro de Ateno ricevis oficialan denuncon de E.A.N.A., laŭ kiu mi „kalumniis Grekujon eksterlande“, kaj pro tio sugestas, ke oni ne plu lasu min eniri la landon.

Tio ĉi jam estas io, kio absolute transpasas la limojn de la imageblaj rajtoj de esperantisto.

Grekujo estas lando, al kiu mi sentas tre altan estimon, kaj mi havis multajn okazojn por tion esprimi. Per la neeblo konfirmi per citaĵo tiun aserton, S-ro Connor rekonas ke li kalumniis min.

Dum 25 jaroj mi praktikas la profesiojn de ĵurnalisto kaj verkisto, kaj por verki miajn dek librojn kaj kvarcent artikolojn, kaj por fari mil sepcent prelegojn en diversaj universitatoj kaj aliaj kulturaj institucioj mi neniam petis konsilon de S-ro Connor pri tio kion mi rajtas esprimi kaj kion ne. Se mi ion opinias, kaj kredas utile eldiri, mi eldiros ĝin spite al opinio de S-ro Connor, spite al polica persekuto, ekzilo aŭ malliberigo. S-ro Connor povos trankvile traserĉi mian ampleksan verkaron, kaj trovi en ĝi eĉ ne unu frazon citindan en siaj atakoj (en lia pamfleto la citaĵo de „Kamarado Sekelĵ el Beograd“ ne estas mia sed de Antonio Sekelĵ).

Ĉu nur al Grekujo iris tia letero pri mi? Ĉu aliaj esperantistoj ankaŭ estis honorigitaj per similaj denuncioj?

Sed la fienco de la atako de S-ro Connor ne estas en ĝia stulteco nek en ĝia malvereco. Ĝi estas en la fakto mem, ke iu, kiu sin kuraĝas nomi „esperantisto“ entreprenas tian *abomenindan* agon, kiel falsa denunco al fremdlanda polico por malhelpi vojaĝon de sendito de U.E.A., kiu oferas siajn energion, tempon kaj rimedojn ekskluzive al la progresigo de nia Movado tie, kie ĝi pleje bezonas ageman homon, ĉar ne ekzistas alia, kaj kiu per sia ĝisnuna laboro pruvis havi Esperanton kiel sian solan celon.

Mi estas absolute certa, ke 99% de la esperantistaro akceptos mian aserton, ke per tia ago S-ro Connor perfidis mian Movadon en la plej fia maniero.

Tamen, al S-ro Connor tio ne multon signifas, ĉar la hont-sigelo de perfidulo eĉ sen tio jam markas lian vizaĝon.

Temas ĉi tie pri la fakto, ke li subskribas siajn kalumniojn oficiale je la nomo de E.A.N.A.

Kaj pro tio, mi direktas min per tiu ĉi malfermita letero al la membraro de E.A.N.A., por aŭdi foje ĝian klaran voĉon. Ĝi devas nepre respondi al la esperantistaro de la mondo al la jena alternativo:

1) Ĉu la membraro de E.A.N.A. komisiis sian sekretarion al tia kontraŭesperanta agado, kaj sekve ĝi deklaras sin solidareca kun lia agado kontraŭ la Movado, kaj ĝiaj manieroj ne indaj je demokrateca pensmaniero.

2) Aŭ la sekretario de E.A.N.A. misuzis sian titolon kaj agis kontraŭ la volo de ĝia membraro, kiu rifuzas solidarecon kun tia agado.

En la unua kazo, U.E.A. devus tute serioze pritrakti tiun deflankigon de la Zamenhofaj principoj de tuta landa asocio. En la dua, pli verŝajna, la sola kulpulo, kiu perfidis ne nur la Zamenhofan ideon sed ankaŭ la membraron,

kies nomon li misuzis, devos esti submetita al sankcioj flanke de tiu membraro, por ke similaj krimaj agoj ne plu okazu, almenaŭ ne je la nomo de granda, respondeca landa esperanto-asocio.

TIBOR SEKELĴ.

En Istanbul, en servo al Esperanto.
2 aprilo, 1956.

Publika letero

Al la Redaktoro de
AMERIKA ESPERANTISTO,
S-ro G. A. Connor,
114 West 16 St.,
New York 11, N.Y.,
Usono.

Estimata Sinjoro Redaktoro!

Ni ricevis represojn de artikoloj el via revuo, kiuj estas tiel tendencaj kaj maljustaj, ke ni ne povas silenti.

Efektive la enhavo de viaj artikoloj estas ofendo al ĉiuj estraranoj kaj komitatanoj de U.E.A., kaj ĉar ĉiuj tiuj estraranoj kaj komitatanoj de U.E.A. estas elektitaj, laŭ tute demokrata maniero, de la landaj asocioj, la enhavo de viaj artikoloj estas ofendo ankaŭ al la landaj asocioj. La komitatano kiun Norvega Esperantista Ligo elektis, agas en plena interkonsento kun nia estraro kaj raportas pri sia agado.

Viaj artikoloj atakas la novan statuton de U.E.A., N.E.L. plene aprobas tiun novan statuton.

Sajnas al ni ke vi sub preteksto de neŭtraleco volas doni al U.E.A. vian propran politikan stampon, N.E.L. per ĉiuj fortoj rifuzas ian ajn stampon. Private ĉiu esperantisto rajtas havi sian politikan konvinkon, sed la Esperantomovado akceptas homojn de ĉiuj konvinkoj, ĉar Esperanto estas la dua lingvo por ĉiuj homoj.

Ĉiu sincera esperantisto sincere bedaŭras la dupartigon de la hodiaŭa mondo. Se Esperanto ekhavas nun la eblecon reekgermi ankaŭ en la oriento, nia movado povas des pli bone antaŭenigi la internaciajn kaj supernaciajn ideojn kaj favori alproksimigon inter la popoloj.

Ni apelacias al vi laŭ demokrata maniero submetiĝi al la vojo, kiun elektis la granda plimulto de la esperantistaro. Tiu plimulto certe atentus ke niaj demokratrajtoj estos gardataj kontraŭ atencoj de ĉiu ajn flanko.

Samideane via
NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
C. Stop-Bowitz,
prezidanto.

John Selbekk,
ĝenerala sekretario.

Germanujo. Aperis belega esperantlingva faldprospekto pri *Wiesbaden*, konata banloko. Oni petu ĝin de: Kurbetriebe der Stadt Wiesbaden, Wiesbaden, Germanujo.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de aprilo 1956

N-ro: 282

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de marto. Ne eblas ĉifoje fari komparon kun la pasinta jaro, ĉar pro tiama prokrasto de enskriboj en la oficejo, la statistiko ne estis farita (Vidu „Esperanto“, Majo 1955, p. 174).

Asociaj membroj

Individuaj membroj

MJ	681
MA	3535
MS	639
Pat.	9
DM	290
HM	54

1956

6658

5208

11866

DELEGITOJ:

Aŭstrujo

- Döllach 11.** FD (Turismo): S-ro Alois Postl, Uzinlaboristo, Post Au, ĉe Aflenz-Kurort, Stirio.
Linz. FD (Abelkulturo): S-ro Leopold Kaufmann, Leonfeldnerstr. 53. Tel. 2-32-35.
Pottschach. D: S-ro Otto Küttelwascher, Instalisto, Pottschach III, 11/4.
Solbad Hall. D: S-ino Erika Beier, Speckbacher-gasse 5.

Brazilo

- Belo Horizonte.** FD (Filatelo): S-ro Lincoln Martins Vianna, Inĝeniero. Postkesto 291, Rua Campanha 51. Tel. 2-15.60, 2-37.23.
FD (Terkulturo): S-ro Joao Vianna, Agronomi-Inĝeniero, Av. Santos Dumont 227. Tel. 2-37.23.
Lajes. D: S-ro Petrônio Ramos Burger, Lignovendisto, rua 15 de Novembro no 63.

Britujo

- Danbury.** FD (Budhismo): vakas.
Bath. D: S-ro Frank William Ashpole, Direktoro, 127 Midford Road. Tel. Combe Down 3327.
Urmston. D: S-ro James Herbert Sullivan, Instruisto, 59 Mount Drive. Tel. LONgford 4329.
FD (Edukado): La D.

Bulgarujo

- Pazardjik.** D: S-ro Petko Arnaudov, studento de matematiko, strato Nikifor Popkonstantinov 30.
FD (Studentaj aferoj): La D.

Danujo

- Viborg.** FD (instruado): vakas.

Finnlando

- Helsinki (Pohj.-Haaga).** VD: S-ro Kaarlo Harteava, Evangelisto, Huovitie 8 B 14. Tel. 47 98 73.
FD (Kristanismo): La VD.

Francujo

- Tourcoing.** D: S-ro Emile Boone, Direktoro de lankombejo, rue de Magenta 3.

Germanujo

- Ansbach.** D: F-ino Anna Hirsch, Rentulino, Alte Poststrasse 5.

Jugoslavio

- Ljubljana.** FD (dent-kuracado): S-ro Peter Zlatnar, dentisto, Rimska 7/III. Tel. 20-360.
Novi Sad. FD (Literaturo): S-ro Zivan Milisavac, verkisto, Augusta Cesavca 5. Tel. 39-44.
FD (vitrajstaj aferoj): S-ro Vécsey Jozsef, vitrajstoj, Ulica Jugoslovenske Armije 106. Tel. 36-82.
Subotica. D: D-ro Mato Brčić-Kostić, profesoro, Boškovicева 6.

Rodezio

- Broken Hill.** D: vakas.

Svedujo

- Malmberget.** D: F-ino Edla Nilsson, instruistino, Björkvägen 10. Tel. 20631.

Usono

- Burlingame.** D: F-ino Catherine L. Schulze, sekretariino, 410 Darrell Road, Tel. Diamond 2 1796.
Elmira. D: vakas.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1956:

439. Seddon, S-ino R., Southport, Britujo.
 440. Sly, S-ro Kenneth A, Letchworth, Britujo.
 441. Turton, S-ro G. H. A., Huddersfield, Britujo.
 442. Wilkinson, S-ro R. B., Colchester, Britujo.
 443. Rasmussen, S-ro H., Brede, Danujo
 444. Arrieu, S-ro F., Toulouse, Francujo.
 445. Borel, S-ro Emile, Arles, Francujo.
 446. Buerick, S-ro R., Calais, Francujo.
 447. Dedieu, F-ino Jeanne, Toulouse, Francujo.

448. Gaillard, S-ro André, Paris, Francujo.
 449. Herlemont, S-ro H., Issy les Moulinaux, Francujo.
 450. Keller, S-ro Ad., la Celle-St. Cloud, Francujo.
 451. Kreibig, S-ro Julio, Nice, Francujo
 452. Lagarde, S-ro L., Paris, Francujo.
 453. Llech-Walter, S-ro R., Perpignan, Francujo.
 454. Maillard, D-ro G., Bourg-la-Reine, Francujo.
 455. Motto, S-ro Roger, Avignon, Francujo.
 456. Petit, R-ro P. Rosny-sous-Bois, Francujo.
 457. Philippe, S-ro H., Arras, Francujo.
 458. Poly, S-ro P., Paris, Francujo.
 459. Thomassin, Abato Paul de, Issy-les-Moulinaux, Francujo.
 460. Yelland, S-ro E. E., Aspremont, Francujo.
 461. Bily, S-ro Harry, Berlin, Germanujo.
 462. Dahlman, S-ro Erich, Berlin, Germanujo.
 463. Dreger, S-ro A., Recklinghausen, Germanujo.
 464. Flick, S-ro Werner, Bad Salzufflen, Germanujo.
 465. Fritsch, D-ro Erdmann, Clenze, Germanujo.
 466. Hauber, S-ro R., Bad Aibling, Germanujo.
 467. Huch, S-ro Willi, Mainz, Germanujo.
 468. Künzel, D-ro Herbert, Bad Hersfeld, Germanujo.
 469. Lamprecht, D-ro Hermann, Essen, Germanujo.
 470. Link, S-ro Karl, Heidelberg, Germanujo.
 471. Michalik, S-ino Frieda, Hösel, Germanujo.
 472. Mutschler, D-ro med. Walter, Württ, Germanujo.
 473. Sandrock, S-ro Otto, Essen, Germanujo.
 474. Treude, D-ro Wilhelm, München, Germanujo.
 475. Maraury, D-ro R., Malaga, Hispanujo.
 476. Marqueta, S-ro A. P., Zaragoza, Hispanujo.
 477. Ménédez Gonzáles, S-ro A., Gijon Hispanujo.
 478. Molera Pedrals, S-ro Ramon, Moya, Hispanujo.
 479. Bonomi, D-ro Paolo, Verona, Italujo.
 480. Muretti, D-ro Inĝ. Mario, Torino, Italujo.
 481. Collins, S-ro Edward, Toronto, Kanado.
 482. Smilga, S-ro Kriš, Toronto, Kanado.
 483. Whitworth, S-ro Albert, Thorold, Kanado.
 484. Boute, F-ino Cécile, Matadi, Kongo Belga.
 485. Cellier, S-ro P., Meknés, Maroko.

F-ino Florence Chevreton, Aŭstralio, estas serĉata de S-ro Józef Konderak, 1 maja 6 m 8, Lublin, Pollando, kiu perdis sian adreson dum milito kaj tre ŝatus ricevi informojn pri ŝi. Kiu helpas?

Junulo izraela, dudekjara, deziras korespondi kun juna nederlanda samideano (ino). Gideon Meromi, Kibuc Gonen. Doar-Na, Galil-Eljon, Izraelo.

Deziras korespondi kun tutmondaj esperantistoj pri diversaj temoj: Faik Çakmak, Çekirge caddesi 80, Bursa, Turkujo.

Deziras korespondi hungara komentanto, mezaĝa oficistino, ŝatanta muzikon, teatron, literaturon. Skribu al: S-ino Heleno Nánai, VII Kertész - uca 44. II. em 6, Budapeŝt, Hungarujo.

Esperanto ĉe la Foiro

La Esperanto-Societo de San Diego havos budon ĉe la „San Diego County Fair” kiun vizitos centmiloj da personoj. Junio 24—Julio 4, 1956. Por plej efike propagandi ni urĝe bezonas ĉiuspecajn flugfoliojn, informilojn, turistajn propagandilojn ktp. Bonvolu sendi ĉion uzablajn al ni. KROME ni bezonas prunte gramofondiskon kun La Espero. Ni resendos ĝin poste. Kiu povos nin helpi??? AL LA VENKO! Esperanto-Societo de San Diego, P.O. Box 4367, San Diego 4, California, Usono.

Mi deziras korespondi kun gesamideanoj tutmonde. Jaume Beltran, Av. Gaudi 6, Barcelona, Hispanujo.

Korespondanta Servo Mondskala havigas korespondantojn el pli ol 30 landoj laŭ-

dezire. Skribu, indikante vian aĝon kaj aldonante respondkuponon, al: Daniel LUEZ, Boulevard Brossolette, LAON (Aisne), Francujo. Naciaj Esperanto-gazetoj bonvolu afable represi tiun anoncon.

Vi ricevos senpage kolekton da bele ilustritaj prospektoj turismaj se vi tuj petos ilin, *pere de nia Esperanto-grupo*, al la plej grava turisma oficejo en Alsaco: Syndicat d'Initiative en Mulhouse. Skribu al: Société ESPERANTO, 24 Faubourg de Riedisheim, MULHOUSE (Francujo). Poŝtkarto sufiĉas. Ju pli da personoj skribos, des pli certe ni sukcesos aperigi pluajn E-prospektojn!

Maja Festo. (15-an de majo). Bonvolu sendi salutojn. Tinkers Farm Girls' School, Birmingham 31, Anglujo.

ORA JUBILEO DE SVEDA ESPERANTO - FEDERACIO

Bela memorkarto aperos kun speciala stampo.

Mendoj kun po unu respondkuponon estu ĉe Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm, Svedujo, plej malfrue la 16-an de majo

ATENTU!

GRAMOFONA DISKO BOLOGNA 1955 SALUTPAROLADOJ

Interesa dokumento
Grava propagandilo
Speco de disko: 45 r.p.m.
Prezo 5 guld.

Mendu ĉe UEA,
Eendrachtsweg 7
Rotterdam-C., Nederlando

Ĉu vi iros al la kongreso en Kopenhago?

Se jes, ekiru unu semajnon antaŭe por ĉeesti la internaciajn somerajn ferian kursojn 28/7—4/8 en

HELSINGØR

kiu situas unu vagonaran horon norde de Kopenhago. Petu senpagan prospekton ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de Prof. G. Waringhien kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj aperas ĉiun duan monaton 32/40 paĝa - - poŝformata jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:
En Francujo: R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj de UEA

Redakcio: 7, Av. Léon-Gourdault
Cholsy-le Roi (Seine) Francujo.
Administracio: 5, Bd. Stalingrad
Nice (A-M)

UNUA INTERNACIA INFANKONGRESETO

en la kadro de la

41-a Universala Kongreso de Esperanto (Kopenhago 4—11 Aŭg. 1956).

Specialaj aranĝoj por Esperanto-parolantaj infanoj de 6 ĝis 13 jaroj

- * restado en frateca atmosfero
- * ludoj, kantoj, prezentado, ekskursoj, vizitoj
- * zorgado dum la tuta kongresa semajno en esperantista spirito

Aliĝu tuj! Petu informojn ĉe:

41-a Universala Kongreso de Esperanto Kopenhago, Danlando aŭ „Internacia Ludoĉambro”, Hartmannsvej 23, Hellerup, Kopenhago, Danlando